Gonçalo Neves

La fia komedio

Ĉe l' fino de la voj' de vivo mia,
mi trovis min ĉe mia skribotablo,
en mensostato plene apatia.
    Mi sidis lace, sena je kapablo
    batali kontraŭ tiel forta gildo
    kaj, ĉefe, ties ruza konestablo.
Jen apenaŭ pensebla nigra bildo:
maŝinoj ĉie regaj, sen escepto,
kontraŭ kiuj ekzistas nula ŝildo.
    Ni staras antaŭ tre stranga koncepto:
    anstataŭ karna, homo nur metala,
    kaj pri danĝero mankas la percepto.
Ĝia labor' montriĝas ideala:
rapida, sendifekta kaj senstrika,
kaj la maŝino estas eĉ lojala.
    Ĉu homa mond' fariĝis arkaika?
    Kie troveblas taŭga antidoto?
    Ĉu temas pri demand' ankaŭ etika?
Se ĉion solvos nur frida roboto,
per kio okupiĝu la homidoj?
Kiun taskon rifuzos la faktoto?
    Al homlabor' ŝuldiĝas piramidoj
    (kvankam eĉ tion iuj forte negos),
    sekretajn sciojn gardis la druidoj.
En mond' estonta, kiu saĝon flegos?
Kiu konstruos, kiel arto floros?
Ĉu iam maŝin' homon eĉ delegos?
    Espereble poetoj nun deĵoros
    per la vibroj de sia laŭta liro
    kaj strebos, luktos (do, ne nur angoros)
por mond' kun pli da am', volfort', inspiro.